Heinrich Heine,

Tombosentenco

tradukita de Manfredo Ratislavo

Kie estos ripozejo
lasta de migranto mi?
Ĉu sub palmoj en forejo?
Aŭ ĉe l´ Rejno sub tili´?

Ĉu enfosos min malpie
iu en dezerta land´?
Aŭ ĉu mi ripozos ie
en la sablo de marstrand´?

Tamen, min ĉirkaŭos ĉie
la ĉiel´ de l´ granda Di´,
steloj tie ĉi kaj tie
lampe ŝvebos super mi.

Traduko de la Germana poemo "Grabspruch" de HEINRICH HEINE *(∗1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de* MANFREDO RATISLAVO *(Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1938-11-04) en 1993.*

MR-261-1c / Arg-63-123 (2010-05-26 19:44:33)